

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Supre tronas sur la monto  
La kapelo en kviet'.  
En la valherbej' ĉe l' fonto  
Ĝoje kantas paštaknabet'.

Kun funebra sonorilo  
Ektimigas mortkantad'.  
Finas tuj la ĝojjubilo  
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto  
Supren en la tombojn venos  
Paštaknabo, laŭ la sorto,  
jen ja Morto vin eĉ prenos.

...

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto  
Ĝoje kantas paštaknabeto.

Sonorado, mortkantado  
Nun eksonas tra l' silento, -  
Haltas knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paštaknabeto,  
Oni iam tien prenos.

...

Ludwig Uhland,  
Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,  
Schauet still ins Tal hinab.  
Drunten singt bei Wies' und Quelle  
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,  
Schauerlich der Leichenchor;  
Stille sind die frohen Lieder,  
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,  
Die sich freut in dem Tal:  
Hirtenknabe, Hirtenknabe!  
Dir auch singt man dort einmal.

...

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Supre staras la kapelo  
Sur la pinto de la mont',  
La paštist' en suna helo  
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto  
De funebro sonas de  
La altaĝ' tra la kvieto,  
La paštist' jam kantas ne.

Gin ne povas aŭdi soni  
La gajuloj post viv-fin'.  
Ho, paštisto, iam oni  
Portos supren ankaŭ vin.

...

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, \*1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11).

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:[http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uwl\\_l03.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uwl_l03.html). Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La poemo estas kanteblo laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie: <http://www.musicenet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).